
EEU- Eŭropa kongreso
KROATIO
Antaŭkongreso
02.07.-06.07. 2014.
Eŭropa Esperanto - Unio
Por efika kaj maldiskriminacia komunikado

# INFORMILO

Karaj gekongresanoj,

Vi certe jam antaŭĝojas kongresi en Rijeka, sed supozante ke vi deziros pli konatiĝi kun unu el la plej belaj marbordoj en la mondo,inter 02.07 kaj 06.07.2014,ni preparis por vi antaŭkongresan programon en urbeto **Biograd**. Ĝi situas iom pli sude, proksime da la urbo Zadar.



En Biograd, la urbo kie iam oni kronis kroatajn reĝojn, nuntempe ne estas pli ol 5500 loĝantoj sed somere ĝi iĝas ege populara turisma loko. Pro sia hortikultura kaj urba beleco en la jaro 2007 oni proklamis ĝin „Arĝenta Europa Urbo“.








En Biograd vi havos eblecon ĝui Kroation per ĉiuj sensoj. Dum la turismumado vi gustumos niajn mediteraneajn manĝaĵojn, aŭskultos muzikon, flaros la sanigan odoron de pinarboj, naĝos en pura maro kaj vespere amuziĝos subĉiele en amika rondo.

Pro la veterkondiĉoj ni eble ŝanĝos ordon de ekskursoj.



## PROVIZORA PROGRAMO


1-a TAGO (02.07.)



Alveno al Biograd.


Nia aranĝo komenciĝos per la vespermanĝo, sed se vi alvenos pli frue vi certe ne enuos. Vipovas u esplori la belecon de la urbo, naĝi en la maro(la plaĝo situas en la urbo mem) aŭ tutsimple vi povos ripozi en unu el multnombraj kafejoj.

2-a TAGO (03.07.)



Post la matenmanĝo ni ekskursos per ŝipo al belega **KORNATI-insularo.** Ni preterpasos belegajn insulojn kaj insuletojn kaj fine ankros en unu el multnombraj golfetoj. Ĉu vi naĝos aŭ nur sunumos estas via propra decido. Post la tagmanĝo, certe bongustos iom da vino☺.Hejmen ni revenos posttagmeze. Tiuj kiuj ne estos lacaj pro la tuttaga ekskurso, povos post vespermanĝo  babili en unu el ĝardenoj..

3-a TAGO (04.07.)



Post la matenmanĝo ni kunepromenos tra Biograd, la resto de la tago estos libera por viaj propraj aranĝoj. Ni certas ke ne mankos fantazio kiel pasigi la tagon.

4-a TAGO (05.07.)



La tuta kvara tago estas rezervita por la kulturo. Post la matenmanĝo ni buse vojaĝos al urboj**TROGIR** kaj**SPLIT.**Tie ni ankaŭ tagmanĝos. Posttagmeze, reveninte hejmenni ekpaku niajn aĵojn.Estus bone frue enlitiĝi, ĉar la morgaŭa tago komenciĝostre frue.

5-a TAGO (06.07.)



Frumatene ni matenmaĝos kaj tuj ekveturos al **LAGOJ DE PLITVICE.** Post la trarigardo de la nacia parko, ni tagmanĝos kaj veturos al **Rijeka**, kien ni alvenos ĉirkaŭ la 18-a horo.Ĉi tie finiĝos nia antaŭkongresa programo kaj komenciĝos la 10-a Eŭropa Kongreso de Esperanto.

## EKSKURSOJ

Ĉiutage ni faros ekskursojn; foje al historiaj lokoj foje al netuŝita naturo, fine ni iros iom for de la marbordo en tre freŝa regiono de mondfamaj Plitvice Lagoj.

Niaj ekskursceloj estas:



### Historiaj urboj Trogir kajSplit

**Trogir** oni konsideras la plej bone konservita romantik-gotika urbo de Mezeŭropo. Ĝiaj kultur-historiaj vidindaĵoj kaj mallarĝaj stratetoj plenaj da artkolektoj surprizos vin.




**Split** estas la plej fama dalmatia urbo. Ĝi ekestis en la jaro 295 kiam romia imperiestro Dioklecian decidis retiriĝi kaj tie konstrui sian palacon. Krom tiun palacon vi povos viziti ankaŭ multajn aliajn vidindaĵojn aŭ tutsimple kiel la fama imperiestro ĝui neniofaradon en iu el multaj ĉarmaj kafejoj marborde aŭ en la ombro de antikvaj domoj.

### Plitvice Lagoj



Plitvice Lagoj ne estas nur kroataj sed ankaŭ UNESCO perloj – ĝia Monda Heredaĵo. Promenado apud 16 smaragdkoloraj lagoj kunigitaj per ŝaumaj akvofaloj  restas memoraĵo por la tuta vivo. Maljuna generacio per ĝi plenumos siajn infansonĝojnviziti lokojn kie oni filmis la filmojn pri la fama indiano Winetou.





**Arhipelago Kornati**

Arhipelago Kornati konsistas el 89 insuloj kaj insuletoj. Por viziti ilin ĉiujn  kaj ĝui belcon de ĝiaj golfoj kaj golfetoj ne sufiĉus monatoj. Ni tamen kaptos okazon vidi iom da ilikaj naĝi en purega maro. Tagmanĝo sur la ŝipo certe bongustos. Trankvileco, suno, blua ĉielo, maro kaj geamikoj kompletigos la neforgeseblan travivaĵon.



## Loĝado

Depende de tio ĉu vi venos sola, kun iu amiko/ino aŭ familio bonvolu elekti unu el eblecoj el nia oferto.

La antaŭkongresa centro situos en **Vilao „E“ ***.** Ĝi konsistas el kelkaj apartamentoj por kvar personoj. Aliaj apartamentoj situas ĉirakŭe en proksimeco ne plifor ol 300m.







**Se vi venas SOLA ni ofertas al vi sekvajn eblecojn**

**VARIANTOSOLPERSONO A*-**dulita ĉambro kiun vi uzos sola. ( dulita ĉambro – unu persono)

**VARIANTO SOLPERSONO B-** en du dulitaj ĉambroj vi loĝos kun mem elektita kunloĝanto aŭ ni trovos lin por vi. Vi ambaŭ havos propran ĉambron sed komunan banejon.(du dulitaj ĉambroj – du personoj)

**VARIANTO SOLPERSONO - HOTELO*-** eblas ankaŭ loĝi en 3-stela hotelo en unulitaĉambro.

**Se vi venas DUOPE**

**VARIANTO DUOPO A-** loĝado en dulita ĉambro. ( dulita ĉambro – du personoj)

**VARIANTO DUOPO B-**en duĉambra apartamento (ĉiu ĉambro dulita) vi loĝos kun via kunloĝanto kune kun alia paro uzante la saman banejon. ( du dulitaj ĉambroj – kvar personoj)

**VARIANTO DUOPO - HOTELO*-** Eblas loĝi ankau en dulita ĉambro en 3-stela hotelo

**Se vi venas kun via FAMILIO**, ni petas kontaktu nin tuj, por ke ni faru specialan oferton por vi depende de nombro kaj aĝo de viaj infanoj.

Se vi havas iujn specialajn dezirojn pri loĝado, aŭ tutsimple pliajn demandojn vi povas skribi al nia kontakpersono David Rey Hudeček telefone- +385 91 721 3036 (vi povas ankaŭ uzi WhatsApp kaj Viber por kontakti nin), rete- dr.hudecek@gmail.com, aŭ ankaŭ en Facebook- https://www.facebook.com/dr.hudecek.

*.Kiel jam dirite, Biograd estas malgranda urbo kiu somere allogas mulajn turistojn kaj pro tio la domoj ĉefe estas konstruitaj por gastigi turistojn venantaj duope, triope, aŭ familie. Malmultas unulitaj kaj hotelaj loĝeblecoj. Pro tio, se vi nepre deziras loĝi en unulita ĉambro aŭ en hotelo, bonvolu tuj kontakti nin. Variantosolpersono A, solpersono-hotelo kaj duopo-hotelo estas limitigitaj per ties kapacito kaj pro tio ni petas vin rezervi ilin kiel eble plej frue.

*****************************************ALIĜILO***********************************************

## Prezoj

La prezoj dependas de elektita loĝvarianto.

| LOĜVARIANTO | PREZO |
|---|---|
| | |
| **SOLPERSONO A** | 459,00 € |
| **SOLPERSONO B** | 439,00 € |
| **SOLPERSONO HOTELO** | Prezo je demando, bonvolu kontakti nin por tiu varianto |
| **DUOPO A** | 419,00 € |
| **DUOPO B** | 365,00 € |
| **DUOPO HOTELO** | 499,00 € |

Ĉiu prezo inkluzivas tranoktadon, tri manĝojn tage*, ekskursojn kaj komunan vojaĝon ĝis Rijeka, kie okazos la kongreso.

*La matenmanĝoj estos organizitaj en Biograd (bufedo),

La tagmanĝoj estos organizitaj dum niaj ekskursoj surloke (vegetaranoj, ni pensas pri vi, do ne timu☺)

La vespermanĝoj estos organizitaj en Biograd (vi povos elekti inter 6 menuoj el kiuj unu estos vegetarana).

Nur trinkaĵoj ne estas enkalkulitaj en la prezoj.

## Aliĝilo

Kiel aliĝi al antaŭkongreso?

1. Vi povas aliĝi per nia aliĝilo.

2.Vi ricevos konfirmilon se via dezirita loĝebleco estas disponebla

3. Post laricevado de la konfirmilo, ni petas vin pagi koston de la aranĝo al unu el la kontoj de EEU:

Konto ĉe UEA: eece-p

Konto ĉe banko ING: **IBAN: BE31380009814855**

**BIC: BBRUBEBB**

Adreso de EEU (se vi devas indiki ĝin en via lando sur ĝirilo):

Wapenplein 17/8, BE-8400 Oostende

4. VIA ARANĜO ESTAS REZERVITA KIAM NI RICEVAS KONFORMILON KE VI PAGIS LA ANTAŬKONGRESAN ARANĜON!!!

## Alveno

Biograd na moru (Biograd n/m) situas 28 kilometrojn sude de Zadar. Aŭtobusoj kiuj veturas el Zadar ĝis Biograd estas oftaj (preskau ĉiun duonan horon) kaj ne estas multekostaj (ĉirkau 4 eurojn).

Al Zadar eblas veni ankaŭ per aviadilo. Ĉi tie vi povas vidi kiuj kompanioj flugas al Zadar.

La antaŭkongreso komenciĝas la 2-an de julio je la 20-a horo per la vespermanĝo. Bonvolu alveni al Biograd ĝis la 17a horo por ke ni povu organizi ĉion por la komenco de la antaŭkongreso.

Atentu: la aranĝo de la antaŭkongreso finiĝas en Rijeka la 6an de julio, kiam komenciĝas la Kongreso!!

Se vi havas iun ajn demandon pri la alveno, bonvolu kontakti nin.

*****************************************ALIĜILO***********************************************

**ADRESO DE ALIĜILO:**

**https://docs.google.com/forms/d/1ATMajlNo_FgfkUkLiseIJ3A36V0ituMQFR8kICqrf3w/viewform**

**Kore,**

**DAVID REY HUDEČEK**

**Trnsko 49d,**

**10020 Zagreb**

**+385 91 721 3036**

**dr.hudecek@gmail.com**

**www.facebook.com/dr.hudecek**